



TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Franclingvaj Esperantistoj

J A R A B O N O

P. BABIN

Jarabono : 80 fkoj

Le Haut des Bourrellières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.C.K Nantes : 2.813.61 L

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

1996 — 4

(OKTOBRO - NOVEMBRO - DECEMBRO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... la suna sistemo ...



... Kaj la Komponisto Franz Schubert

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

deziras ĉion bonan dum la venonta jaro.

ESPERANTO TRA LA MONDO

PREUNIVERSITATAJ SOMERKURSOJ: La prilingva fakultato de la universitato de Santiago-de-Compostela (Hispanio) organizos, de la 15-a de julio ĝis la 15-a de aŭgusto 1997 somerkursojn en Esperanto. Dum prepara kunveno kun la lokaj aŭtoritatoj, en la ĉeesto interalie de du eminentuloj esperantistaj: Prof. Reinhard Selten, nobela premiito 94 pri ekonomio kaj Prof. John Wells, de la universitato de Londono, oni eksklis, ke jam oni preparis parton de la kursa materialo pri diversaj fakoj. La hispana ministro pri Edukado kaj Kulturo sendis kuraĝigon. Informas: Instituto de Idiomas, Curso de Esperanto, Av. de Castela s/n-ro, ES-15705, Santiago-de-Compostela, Hispanio.

POST LA KONGRESO EN PRAGO: El la multaj mesaĝoj ricevitaĵoj okaze de tiu kongreso notinda estas tiu de S-ro Boutros Boutros-Ghali, ĝenerala sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj, kiu tekstas: "Vi faras apartan impreson ĉe ni, en Unuiĝintaj Nacioj, per via kapablo kunveni kaj debati sen interpretistoj".

La kongresanoj adoptis gravan tekston "Manifesto de Prago", kiu difinas la celojn de la movado en la nuntempo. La teksto estas tradukita en plurajn lingvojn.

EL IRANO: Post longaj klopodoj Irana Esperantista Junulara Organizo estis oficiale registrita, kiel neprofitema instituto kun jura personeco sub la nomo "Sabz Andishan" (Verdpensularo). Adreso: M. Reza Torabi, PO Kesto 17765-184, Tehran, Irano.

EL AZIO- Lastsomere okazis la unua Azia Kongreso en Sanhajo. Ĉeestis 584 esperantistoj el 18 landoj. Estis decidite, ke la dua kongreso okazos en Vjetnamio post tri jaroj.

Internacia Esperanta Somera Semajno por infanoj kaj gejunuloj sukcese okazis en Pekino. Edukistoj ankaŭ partoprenis; entute pli ol 300 homoj. En pluraj urboj okazas esperanto-kursoj en elementaj kaj mezaj lernejoj. En Pekino eblas lerni esperanton ĉe la universitato kaj en altlernejoj.

KELKAJ INTERNACIAJ RENKONTOJ: Internacia Kultura Semajnfino en Antverpeno, 30-an de majo/1-an de junio. Interesaj vizitoj. Adreso: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Itala Kongreso de Esperanto, en Napoli, 23-an/29-an de aŭgusto. Adreso: Napola Esperanto-Grupo "Harmonio kaj Progreso", via Santa Brigida 64 (4.p. c/o UNUCI) I- 80132 Napoli, Italio.

Kantado kaj Skiado, 25an de februaro/3an de marto en la pirenea franca departemento Ariège. Informas: Georges Comte, FR-09120 St. Félix-de-Rieutort, Francio.

Semajnfinaĵoj kursoj en okcidenta Francio: Nantes 15-16an de februaro; Préfaillies (marbordo), 17-19an de majo. Informas: F. Vince, 13, rue Schweitzer, FR-44600 Saint-Nazaire, Francio.

LASTE APERIS: "La morto neniu forgesas", de la konata franca aŭtoro de detektivromanaroj Didier Daeninckx, tradukita de Christian Rivière. La travivaĵoj de juna rezistanto dum kaj post la dua mondmilito.

Du libroj de Franz Kafka: "La metamorfozo", traduko de Mauro Nervi, kaj "Sonĝo kaj aliaj rakontoj", traduko de W. Lutterman.

"Naskiĝo de la rustimuna ŝtalaro", sciencfikcia rakonto de Harry Harrison.

En la literatura serio de "Franca Esperantisto" aperis kajero pri verkaĵetoj de Florian kaj romano de Jean Giono: "Reĝo sen distriĝo".

Ankaŭ novaj kasedoj- "De tempo al tempo", kantoj de Mikaelo Bronŝtein, rusa esperantista kantisto. "Mi rompas mian rutinon" kaj "Poemoj, kanzonoj, monologoj" de la kuba aktorino Georgina Almanza.

\$

LA KANCERKLINIKO

Antaŭ 20 jaroj aperis n-ro 1

Nun aperas n-ro 80

Gratulojn al Jak Le Pul kaj la tuta skipo de kunlaborantoj.

\$

LA SUNA SISTEMO

NASKIĜO KAJ KONSISTIGO

(Fino)

3) La malkovro de la diversaj izotopoj

Oni scias, ke izotopoj estas atomoj, en kiuj la nombro de la protonoj kaj elektronoj estas egalaj, sed en kiuj la nombro de la neŭtronoj estas malsimila. Tiuj substancoj havas la samajn kemiajn reagojn. La plej konata ekzemplo estas tiu de la "karbono 14". La stabila karbono havas 6 elektronojn, 6 protonojn kaj 6 neŭtronojn. Do en la nukleo de la atomo estas 12 pezaj eroj (protonoj kaj neŭtronoj havas saman mason). Kontraŭe en la "karbono 14" estas 8 neŭtronoj. La 6 protonoj kaj 6 elektronoj donas la samajn kemiajn proprecojn, sed la pezo estas 14. Tiu atomo estas radioaktiva kaj iom post iom transformiĝas en nitrogenon. Dank'al tiu iom-post-ioma transformiĝo oni povas dati la objektojn, kiuj entenas karbonon. Oni speciale studis oksigenon, kiu stabile estas O(16) sed ekzistas la radioaktivaj O(17) aŭ O(18). Oni konsistigas, pere de diversaj aerolitoj, ke la kvanto de O(17) kaj O(18) ne estas la sama en diversaj partoj de la suna sistemo. Kaj eĉ sine de la sama aerolito Profesoro Clayton el Ĉikago trovis ne saman kvanton de izotopoj pri oksigeno. Kompreneble oni kompletigis tiun malkovron per studo de aliaj atomoj ol oksigeno, en diversaj aerolitoj; post multaj studoj oni fine konkludis, ke la materio de la suna sistemo ne estas homogenaj. La diversaj solidaĵoj de la suna sistemo estis fabrikitaj en malsamaj steloj, do ne venis de la suno.

4) La malvarma formado de la suna sistemo - Se la diversaj materioj estus arigitaj apud varma suno, tiu varmeco estus fluidiginta la materion, kaj poste oni estus trovinta homogenan sistemon. Pro tio oni nun pensas, ke la materioj transiris de gaso al solido ne en la "suna nebulozo" sed antaŭe, en diversaj lokoj. Pro la kompleksaeco de iuj materioj, oni opinias, ke tio okazis pro eksplodo de supernova, ĉar la suno neniam kapablis sintezi la pezajn atomojn, kiuj nun ekzistas en la suna sistemo. Oni ankaŭ povas supozi, ke tiu eksplodo kaŭzis ondon, el kiu naskiĝis la malvarma suna "nebulozo". En tiu nebulozo ekzistis kaj gasoj kaj solidaĵoj, kiuj formiĝis

el diversaj steloj kaj tial pravigas la izotopajn diferencojn. Sed restas du demandoj: kiel formiĝis la diversaj nunaj planedoj, kaj kiel la planedoj estas tiel, kiel oni klarigis en la antaŭa hipotezo.

41) La formado de la planedoj.

Oni scias, ke la steloj formiĝas sub la influo de la gravito, sed tiu fenomeno estas relative rapida, la tuto atingas tre altan temperaturon, kaj tiam okazus homogeniĝo de la materio. Oni do devas trovi alian mekanismon: arigo de diversaj malgrandaj partoj, kiujn mi nomos "planederoj" (france "planétésimal"). Planedero estas solidaĵo, kies dimensioj iras de gruzo al planedo, kaj tiuj planederoj sin altiras reciproke kaj povas okazi aŭ formado de pli granda objekto, aŭ, kontraŭe, displitiĝo. Oni scias, ke ju pli grandaj estas la planederoj, des pli ili riskas displitiĝon, kaj aliflanke, ju pli la planederoj estas grandaj des malpli oftaj estas la renkontoj inter ili. Kiam la planederoj estas polvoj, ili multas, kiam ili estas grandaj, kiel piedpilkoj, ili tre malmultas. Oni tuj komprenas, ke tia formado estas multe pli daŭra ol formado per influo de la gravito. Pluraj milionoj da jaroj anstataŭ centoj da jaroj.

Sed ne sufiĉas aserti, kiel oni praktikas por la mitoj: en scienco oni devas pruvi. Tre gravis en tiu pruvo la vojaĝo de la homoj ĝis la Luno. Oni konsilcis, post la rikolto de rokoj sur la Luno, pri la valoro de la diversaj aerolitoj, kiujn oni konis delonge. Oni unue konsistis, ke la Luno estas kovrita de tio, kion oni nomas "krateroj", kaj oni nun scias, ke plejparte ili ne devenas de vulkanoj, sed estas cikatroj lasitaj post faloj de aerolitoj. Oni studis tiujn cikatrojn, kaj oni malkovris, ke la plej malnovaj estas same aĝaj, kiel la suna sistemo (4,5 miliardoj da jaroj) dum aliaj aĝas ĉirkaŭ 3,2 miliardojn da jaroj. Ĉrome oni datis per izotopoj la aĝon de la lunaj rokoj, kaj oni konsistis ne nur, ke la plej malnovaj partoj havas pli da cikatroj, sed ke la nombro de faloj tre rapide malkreskis en la daŭro de la luna vivo.

Por esti kompleta en tiu teorio, oni devas aldoni, ke oni trovas cikatrojn ne nur sur la Luno, sed ankaŭ sur la planedoj kaj iliaj satelitoj, de Merkuro ĝis Neptuno. Kompreneble oni konas iajn sur la Tero, sed tie ili estas ofte kaŝitaj de la vegetaĵoj. Fine oni klarigas la ekziston de la tiel nomataj asteroidoj inter Marso kaj Jupitero. En tiu regiono, la renkontoj ne kondukis al

LA EJFEL TURO

(fino)

aldono de materio, sed disiĝo de la planederoj.

42) La influo de la suno - Laŭ tiu teorio, la suno ne agis, kiel komenco de la formado de la planedoj, sed ĝi ŝanĝis la situacion de la jam ekzistantaj planedoj. Jen kelkaj nombroj, kiuj proksimume montras la evoluon de la situacio.

Antaŭ 4 567 milionoj da jaroj: Super-nova eksplodas kaj kreas ondon, kiu puŝas gasojn kaj malvarmajn planederojn en rotacian vorticon.

Antaŭ 4 566 milionoj da jaroj komenciĝo de la planeda formado.

Antaŭ 4 500 formado de la ardanta suno.

Antaŭ 4 456 la planedo Tero estas formita.

La suno ekbrilis, kiam la planedoj estis formiĝantaj, la granda varmo kaj la granda varma blovego agis sur la planedoj. En tiu katastrofo Merkuro perdis sian atmosferon kaj konservis nur la materiojn, kiuj povas elteni altajn temperaturojn. Venuso, Tero kaj Marso perdis sian primitivan atmosferon sed kelkaj gasoj, kaptitaj en la rokoj, estis konservitaj kaj poste reaperis ĉe la diversaj surfacoj, kiel oni klarigis pli supre. Kontraŭe Jupitero ricevis ĉiujn gasojn de la plej internaj planedoj kaj pro tio ĝi estas la plej granda planedo de la sistemo. La sama fenomeno, sed malpli grava, okazis por la aliaj eksteraj planedoj.

Provizora konkludo - La Tero estas tute originala planedo pro sia distanco al la Suno. Dank'al tiu distanco ĝi povis konservi sufiĉe da vaporigemaj elementoj el kiuj naskiĝis akvo. Pli proksime al la Suno, tiu akvo estus forblovigita de la vento de la naskiĝanta Suno, kiel tio okazis sur Venuso. Pli malproksime ĝi konsistis el heliumo kaj hidrogeno. La fenomenoj, kiuj naskis ĝin estas konformaj al la ĝeneralaj leĝoj de fiziko kaj kemio; kio estas aparta estas ilia kombino en speciala tempo kaj en speciala loko, kontengeca fenomeno. Ĉu hazardo?

Kompreneble, tio estas nur la komenco de la historio de la Tero. Oni poste devus klarigi, kiel la diversaj partoj de la planedo aranĝiĝis, sed kiel diris Kipling, "tio estas alia rakonto."

Tiu ĉi daŭris dudek ses monatojn. La regule kreskanta "planto" estis la celo de la dimanĉaj promenadoj de la parizanoj. Sed Guy de Maupassant, unu el la kontraŭantoj, forlasis Parizon ĉar "la Eĵfel Turo tro tedis lin."

La motora mekanismo de la liftoj de la dua etaĝo, la pumpiloj, kiuj funkciigas la pistojn de la lifto de la tria etaĝo, la pumpiloj, kiuj alportas la trinkeblan akvon kaj la aldona malgranda elektra centralo, estas lokitaj en la subtera strukturo tute malplena. Pli ol 200 homoj, zorge selektitaj, laboris inter tero kaj ĉielo. Por ne malŝpari tempon (1789 ŝtupoj ebligas la supreniradon ĝis la pinto), ekzistis komuna restoracio sur la unua etaĝo, kie manĝis, malmultekoste, la laboristoj. Dum dek horoj ĉiutage ili moviĝis, kiel surtere. Ili ne sentis iun ajn danĝeron. Fakte, en dudek ses-monata konstruado "nur" unu akcidento okazis: junulo falis de la unua etaĝo.

La malfermo de la Ekspozicio okazis la 15-an de julio 1889. Journalistoj, oficialuloj supreniris ĝis la "zenito". La irado supren daŭris iom pli ol unu horo. Tiu Ekspozicio estis malfermita dum 6 monatoj kaj la Turo akceptis preskaŭ du milionojn da vizitantoj, kiuj lasis komfortan financon profiton. Kelkaj kontraŭuloj publike konfesis kaj la Turo daŭre estis honorata... ankaŭ laŭ komerca vidpunkto. Pri tiu aspekto de la "vivo" de la Eĵfel Turo jen kanzono skribita de Victor Meusy:

" Por daŭre ĝin, karan, kontempli
Mi de Parizo alportis
Kvindek aĵojn el la Ekspo'
Artaĵojn kaj...mastrumaĵojn.
Sur promenbaston' mi havas
Kaj tenas ĝin en mia man';
Mi dum ĉiutaga promenad'
Rigardas ĝin kaj karesas.
Ĉiuvesper', sur Eĵfel Tur'
Mi estingas la kandelon.
Ĝi ornamas teleraron,
Kaj salon, pipron proponas
Ĝin mi portretis, meze de mia' spegul'
Kaj kiam mi rigardas min,
Ĉefe ĝin vidas mi.

Antaŭ 200 jaroj naskiĝis

FRANZ SCHUBERT

Franz Schubert naskiĝis en Vieno la 31-an de januaro 1797. Lia patro estis malriĉa, tre laborema lernejestro; lia patrino estis kuiristino, Elizabeta Vitz; ŝi estis sep jarojn pli aĝa ol sia edzo. De tiaj humilaj gepatroj devenis geniulo; ili havis dekkvar infanojn. Franz estis la dektria, malbonŝance, eble, por li, ĉar lia vivo estis plena je malfacilaĵoj kaj maljustaĵoj sed bonŝance por la posteularo, ke tia beleza muziko donaciĝis al la mondo.

Eble estos interese ion diri pri Vieno, kia ĝi estis dum la vivo de Schubert. Ĝi estis urbo, kiu neniel admiris la arton, kaj ekzistis sole por si mem, por siaj plezuroj kaj pasioj. Ĝi estis tre malbone prizorgata; eĉ la malmultaj ĉefstratoj ĉiam estis malduregaj, kaj la flankstratoj tute ne havis trotuarojn. La domposedantoj devis konstrui kvazaŭ ponteton el traboj antaŭ siaj pordoj, por ke oni ne tro trempiĝu en la koto. Eĉ antaŭ la Kärntnerthor, unu el la plej gravaj pordegoj de Vieno, estis grandega kotlago, kiu restis tie dum multaj jaroj, eĉ ĝis 1816.

La malriĉuloj loĝis en etaĝdomaĉaroj, kies ĉefŝuparo ĉiam estis kovrita per fruktseloj kaj malfreŝa rubaĵo, kiujn oni elĵetis el la apudaj pordoj: neniu estis ĝenata de la forĵeto de tiuj aĵoj. Oni piedpremis la koton de la stratoj en la kovraĵoj de la ŝuparo. La malfrue hejmenirantaj ebruloj falis en la ĉef enirejon kaj restis tie ĝis la mateno, kiam iu bonkorulo ilin trovis je tagiĝo kaj helpis ilin al ilia ĉambraro. Brulegoj ofte okazis, kaj oni kutime alvokis la Imperiestron kaj liajn filojn, por ke ili, surĉevale, estru la laboron de savado. La ĉeesto de regnestro ĉe ĉiu brulego nepris laŭ malnova leĝo, kiu postulis, ke la Imperiestro gardu sian popolon persone. Fakte, ĝis Lia Moŝto alvenis, oni ne multe ĝenis sin pri la savlaboro, kaj ofte tuta konstruaĵo, aŭ tuta aro da konstruaĵoj detruigis, antaŭ ol la imperiestraj ordonoj estis sciigitaj al la atendanta savontaro.

Estis tuta subpremo de pensado kaj memopinio en Vieno en tiu tempo, kaj tio

ĉi kaŭzis malrespekton inter la sociaj klasoj. La malriĉulo ĵetis insultojn trans la straton al la grafo, kaj la vendejaj virinoj disĵetis insultojn al ĉiuj kaj ĉiaj personoj, kiel grenventumajon de draŝilo; se iu kuraĝis marĉandi, okazis vera lavango da blasfemoj, homamaso kolektiĝis kaj alvenis la polico, kiu nur flankenstaris kaj ridis. Estis nur unu ebla fino al la afero: forkuro! La vendejaj virinoj ĉiam venkis!

La bruego en la stratoj estis konfuza; oni certe bezonis Esperanton tie! Germanoj, Italoj kaj Kroatoj kriegis siajn varojn laŭ siaj diversaj lingvoj. Estis virinoj, kiuj portis korbojn plenajn je ovoj aŭ floroj, kroatoj kun vinberoj kaj fromaĝo; Italoj salami-vendistoj, bakistoj, tapiŝ-vendistoj, bird-kaptistoj kaj vendantoj de muskaptiloj, ĉiuj kriegante samtempe la bonan kvaliton de siaj varoj. Oni aŭdis ankaŭ la raŭkan, malgajan krion de la rubajisto: "An Aschen! An Aschen!" kaj la klakadon de la "malgranda poŝtisto", la viro, kiu ĉirkaŭpromenis la stratojn por kolekti la leterojn en ligna skatolo, ĉar ne estis leterkestoj. La sufiĉe bonhavaj virinoj portis virajn paltojn kaj la viroj mufojn! Tia estis la renversigo de la modo kaj tia la urbo en kiu Schubert naskiĝis.

Lia patro tre deziris, ke ankaŭ Franz estu lernejestro; laŭ li ĉiu Schubert devas instrui. "Sendube," li opiniis, "tiu ĉi neordinara filo, kiu skribaĉas muzikerojn ĉiam kaj ĉie, post nelonge devos lerni la metion de la aliaj familianoj. Franz estis tro juna por diskuti kun sia patro la eblecon de vivrimedo per muziko. Eĉ se li estus tion farinta, sendube lia patro estus dirinta al li, ke la instruado donos al li vivrimedon kaj la muziko "mortrimedon".

Ĉi tiu familio, kiu pasigis ordinaran, laŭregulan vivon, kiu nur ĝenis sin pri la akiro de la ĉiutaga pano, tute ne povis kompreni la alvenon de geniulo inter si. Generacioj de Schubertoj ĝis tiam ne produktis geniulojn, nur simplajn labor-emajn homojn. Laŭ la lernejestro Schubert muziko nur estis luksa amuzaĵo. Oni ne multe admiris la muzikarton en Vieno je tiu tempo, kaj certe ne klopodis akiri vivrimedon per ĝi. Nur malsaĝuloj fariĝis profesiaj kaj nur unu malsaĝulo el miloj akiris riĉecon! Post multaj jaroj la lernejestro fieris pri sia filo, sed li neniam vere entuziasmiĝis pri la majstraĵoj de Franz, eble, ĉar la kompatinda knabo ĉiam estis tiel malriĉa.

Tamen, kvankam li tiom deziris, ke lia filo ne fariĝu muzikisto, estis la patro mem, kiu instruis al Franz la notojn kaj elementojn de la muziko, kaj estis lia plej aĝa frato, Ignaz, kiu instruis al li la violonon; sed li tiom rapidege progresis je la instrumento, ke tre baldaŭ la instruisto multe superis la instruinton; kaj Ignaz transdonis la edukadon de Franz al Mikael Holzer, la loka ĥorestro; li estis la unua persono, kiu rekonis la veran genion de la knabo. La fortepianon, la orgenon, la violonon lernis la juna Schubert tiel facile kaj rapide, ke Holzer baldaŭ rekonis, ke li havas sub sia zorgo tre neordinaran lernanton. Li skribis pri li: "la tuta estaĵo de tiu strange malgracia, malalta junulo ŝajne estas trempata en muziko".

Franz ja estis malgranda, dika vireto; li portis ŝtalajn okulvitrojn, ĉar li estis tre miopa; liaj manoj estis dikaj kaj liaj fingroj tre mallongaj; li certe ne posedis la tradiciajn "longajn fingrojn de la muzikisto". Li posedis tiel belan voĉon, ke li fariĝis ĥoristo de la Imperia Kapelo sub la instruado de la kortega kapelestro Salieri, kiu estis amiko de Beethoven. Li ne multe ĝenis sin pri la instruado de Schubert, ĉar tiu estis nur malriĉa knabo. Tamen Franz daŭre komponis sekrete; liaj komponaĵoj estis kaŝitaj kaj perditaj preskaŭ tuj, kiam li estis metinta ilin sur paperon. Tio okazis kompreneble dum liaj lerneaj tagoj, kiam li estis tre retirigema kaj ne multe deziris la kunecon de siaj kamaradoj; ŝajne li estis tute feliĉa sola kun sia muziko. Dufoje lia patro elpelis lin de la hejmo, ĉar li pli atentis la muzikon ol la lernejan studadon; lia malriĉeco pligrandigis kaj lia entuziasmo por la muziko pligrandigis samtempe; je tiu tempo oni ne povus troigi lian korpan mizeron. Li tute ne havis monon; la manĝoj ĉe la lernejo estis malbonaj kaj nesufiĉaj.

La financa stato de Vieno en 1811 estis terura, la ŝtato estis bankrota kaj la floro valoris nur la kvinonon de sia kutima valuto. Schubert devis labori en malkomforta, malvarma ĉambro; li ĉiam estis malsata, sed li komponis kaj komponis; li estis feliĉa. Se lia korpo suferis, lia menso rifuzis konscii tiun suferon; li vivis nur por sia muziko. Anton Stadler, amiko lia, skribis: "Estis interese rigardi lin dum li komponis. Tre malofte li uzis la fortepianon; li diris, ke ĝi interrompas la fluon

de la pensoj. Tre trankvile kaj ne ĝenate de la babilado kaj bruemo de siaj kunuloj, li sidis ĉe sia tablo kaj sin klinis super la papero, de tempo al tempo mordante la plumon aŭ ludante per la fingroj sur la tablo, kvazaŭ li provus arion. Li verkis facile kaj flue, kaj preskaŭ sen iaj postaj ŝanĝoj. Lia plej frua komponaĵo, kiun oni konservis, estas "Fantazio", dueto fortepiana, kiun li verkis en majo 1810.

Unu el liaj unuaj kantoj estis "Erlkönig" (Elfreĝo); la poemo estas de Goethe, poeto, kiun Schubert multe amis, sed kiu rifuzis aŭskulti, aŭ eĉ rigardi la muzikon, kiun Schubert komponis por liaj poemoj; tion li poste bedaŭris, ĉar okazis, ke du jarojn post la morto de Schubert, Goethe aŭdis faman kantiston kanti ĉi tiun kanton "Erlkönig", kaj oni diras, ke la emocio tute superregis lin; la mirinda beleco de la melodio plenigis liajn okulojn per larmoj kaj lian koron per konscienciproĉo, ke li ne pli frue rekonis, aŭ eĉ provis rekonii, la veran genion de Schubert.

Tiu ĉi kanto estis unue kantata publike en 1821 de Vogl, tre fama kantisto kaj fidela amiko de Schubert; oni akceptis ĝin kun tre granda ovacio. Vogl tre deziris, ke Schubert mem ludu la fortepianon akompanaĵon, kiŭ estas mirinde bela, sed la komponisto estis tro modesta por montri sin sur la estrado. Ĝi estis lia unua verko, kiu eldoniĝis, kaj oni sukcesis tion fari nur per la kotizoj de diversaj amikoj. En tiu tempo neniu eldonisto estus konsentinta eldoni la verkon de Schubert, ĉar li estis tiel malriĉa kaj, krom inter siaj propraj amikoj, ne bone konata. Kiam, post multaj jaroj, eldonistoj akceptis kelkajn el liaj komponaĵoj, ili utiligis por si la malriĉecon de Schubert kaj plenigis siajn monujojn je la kosto de lia ĝeneco. Ili bone sciis, ke li preskaŭ ĉiam estas ŝenmona kaj tiom superŝutita de ŝuldoj, ke li dankeme akceptos la plej absurdajn prezojn por siaj manuskriptoj, nur por havigi al si iomete da mono.

Kiam oni unue prezentis la unuan operon de Schubert "Die Zwillingsbrüder" (La Ĝemeloj), aŭdiĝis multaj alvokoj por la verkinto, sed li ne povis sin montri por akcepti la merititan aplaŭdon... ĉar li ne posedis frakon!

(daŭrigota)

KVIZO

Kun la usonangla signifo, tiu ĉi vorto eniris en la leksikon de pluraj etnolingvoj, jen sen asimilado kiel la germana "Quiz", jen fonetike asimilita kiel hungara "Kviz". La primara signifo estas "demandaro", en lernejoj mallonga buŝa aŭ skriba ekzameno. Tre ofte kvizo estas testo pri ĝeneralaj scioj, kutime en la kadro de konkurso. Kvizoj aperas ofte en periodaĵoj, kaj tre popularaj estas radiaj kaj televidaj kviz-programoj. Okaze de esperantistaj aranĝaĵoj, kvizoj temas pri la historio de la movado aŭ la literaturo.

BLINDULOJ KAJ

ESPERANTO-MOVADO

La sekcio en "Esperanto en Perspektivo" pritraktanta la organizadon de blinduloj en la Esperanto-movado (pĝ. 514-515) komenciĝas jene: "Blindaj esperantistoj ne estas, nek volas esti, aparta kategorio de praktikantoj de Internacia Lingvo; pro sia blindeco ili nur devas havigi al si lernilojn, komunikilojn kaj literaturajn trezorojn per metodoj sendividaj." La nuna kvizo temas pri kelkaj aspektoj de la agadoj de nevidantaj esperantistoj. Troviĝas ankaŭ du demandoj pri blindaj rolantoj en beletraĵoj.

1- Kiu estis la franca instruistino pri prononcado, kiu dediĉis sian vivon al plibonigo de la stato de surdmutuloj, balbutuloj kaj blinduloj? Esperantistiĝante en 1895, ŝi samjare instruis Esperanton al la unua blinda esperantistino, la svisino Hélène Giroud.

2- La plej elstara pioniro sur tiu ĉi tereno estas surda kaj blinda svedo, kiu lernis Esperanton en 1900 kaj okupiĝis pri la disvastigo de la Internacia Lingvo inter siaj samsortanoj. Laŭ profesio li estis presisto de brajlaj libroj.

3- La unua instruisto de Esperanto-kurso por blinduloj estis franca profesoro pri lingvoj, kiu plenumis plurajn gravajn funkciojn en la frua historio de la Esperanto-movado. Konata kiel "Blankbarbulo", li interesiĝis speciale pri la uzo de Esperanto por blinduloj. Kiel li nomiĝas, kie li instruis sian kurson kaj kio estis la plej grava rezulto?

4- Kiel nomiĝas la unua periodaĵo presita per punktskribo? Kiu fondis, redaktis kaj presis ĝin?

5- Kiu eminenta franca okulkuracisto kaj politikisto, esperantisto ekde 1903 kaj persona amiko de d-ro Zamenhof, fariĝis blinda en sia 62-a jaro? Kiel nomiĝas la libro, kiun li verkis pri sia sperto?

6- En 1908 estis eldonita en Helsinko unuakta lirika dramo tradukita el la dana lingvo. Ĝi temas pri blinda princino, kiu reakiris la vidpovon pro sia amo por la kavaliro Tristano kaj per magiaj artifikoj de la maŭra kuracisto Ebn Jahia. Kiel nomiĝas la peco, kiu verkis ĝin kaj kiu esperantigis ĝin?

7- Kiam kaj kie okazis la unua kongreso por blindaj esperantistoj?

8- Kiu romano originale verkita en Esperanto de nederlanda aŭtoro, priskribas Pacifikan insulon loĝatan de blinduloj kaj komparas la tiean sociordon kun nia civilizacio?

9- Kiel nomiĝas la internacia organizaĵo de esperantistoj-blinduloj, kaj kiam ĝi estis fondita?

10- En 1977 aperis en Kiev la dua eldono de biografio en la ukraina lingvo pri blinda esperantisto, kiu akiris famon kiel verkisto de originalaj beletraĵoj. Kiel li nomiĝas, kaj kiu verkis lian biografion?

RESPONDOJ- 1. Jeanne Ranfaing Zablon d'Her (1866-1936), kies pseŭdonimo estis Evidino, prezentis paroladojn kaj verkis artikolojn pri Esperanto, ankaŭ instruis kursojn kaj organizis internacian lotieron por la tutmonda blindularo. Antaŭ la unua mondmilito ŝi kontribuis al "L'Espérantiste" per noveletoj kaj poemoj kaj tradukis en Esperanton la prireligian verkon de J. Serre "La Hipotezoj de Lourdes" (1912).

2- Harald J.E. Thilander (1877-1958) verkis multnombrajn artikolojn por francaj, anglaj kaj germana porblindulaj gazetoj. Li redaktis kaj presis ankaŭ esperanto-periodaĵojn. Dufoje li "edzperantistiĝis". Lia unua edzino, svedino Karin Höjer (1866-1927), estis orgenistino kaj muzik-instruistino. Post ŝia morto, Thilander edzinigis Elisébet Varna el Finnlando, kiu verkis originale en Esperanto kaj ankaŭ

tradukis beletraĵojn en la zamenhofan lingvon.

3- Théophile Cart (1855-1931), kiu esperantiĝis en 1901, kunfondis kaj administris la gravan eldonejon "Presa Esperantista Societo" kaj estis prezidanto de la Akademio de Esperanto. En 1904 li organizis Esperanto-kurson en la blindulejo de Lausanne, Svislando. Kunlabore kun siaj plej bonaj lernintoj, Helena Gal, Roza Vogt kaj kun Harald Thilander, Cart adaptis la brajlan alfabeton al Esperanto. Poste li presigis Esperanto-lernolibrojn en pluraj lingvoj.

4- "Esperanta Ligilo" estis fondita de Théophile Cart en Parizo en 1904. Ĝia enhavo konsistis el blindulaferaj kaj pri-esperantaj artikoloj kaj ankaŭ beletraĵoj. Ekde 1912 ĝi estis redaktita kaj presita de Harald Thilander en Stokholmo. "Esperanta Ligilo" ankoraŭ ekzistas; nuntempe ĝi estas la organo de la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE).

5-a. Emile Javal (1839-1907) inventis utilajn oftalmologiajn instrumentojn por okulmezuroj kaj publikigis verkojn pri la fiziologio de la skribado. Lia francelingva libro "Entre Aveugles", verkita post la perdo de lia vidpovo, estis tradukita Esperanten fare de lia bofilino kun la titolo "Inter Blinduloj: Konsiloj por Uzado de ĵus Blindiĝintoj" (1907).

6- "Jolanto, la Filino de l'Reĝo René", kies originala titolo estis "Kong René Datter", estis verkita de Henrik Hertz (1798-1870), dana poeto kaj teatraĵ-verkisto, kaj eldonita en Kopenhago en 1845. La tradukinto estis Hjalmar Johannes Runeberg, finland-sveda literaturisto, kiu estis esperantistigita fare de Théophile Cart en 1901. Poste li instruis kursojn por blinduloj.

7- La unua blindula kongreso okazis en Prago en 1921. Ĝi estis direktita de Théophile Cart post prepara laboro de la blinda muzikisto K.E. Macan kaj la vidanta blindamiko prof. Stanislav Trejskal. Dek kvar jarojn pli frue grupo da blinduloj partoprenis en la 3-a Universala Kongreso en Kembriĝo, Anglio. Cart zorgis ankaŭ pri tiu grupo, kaj d-ro Zamenhof havis okazon renkontiĝi kun ili.

8- "Inferio", fantaziromano verkita de Hendrik J. Bulthuis (1865-1945), estis eldonita en 1938. Unu el la tri malkovrintoj de la utopia insulo de la blinduloj estas kuracisto, kiu, per simpla operacio, redonas la vidpovon al tri insulanoj, por ke ili povu viziti la urbon Saidumo en Inferio kaj observi la civilizacion. Tiu ĉi, laŭ la aŭtoro, estas la antipodo de la harmonia socio de la blinduloj.

9- La Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) estis fondita en 1950 kun la celo unuiĝi blindulojn en la tuta mondo por la plibonigo de ilia sorto kaj ĉiurimede disvastigi Esperanton inter la blinduloj. Ĉiujare LIBE laŭpove aranĝas Internacian Kongreson, ĝenerale kadre de la Universalaĵ Kongresoj; Ĝia organo estas "Esperanta Ligilo". Unu el la iniciatiintoj de LIBE, kaj dum pli ol tridek jaroj la redaktoro de ĝia organo, estas Raymond Gonin, nevidanta franca esperantisto, kiu fariĝis honora membro de UEA en 1994.

10- En 1973 kaj denove en 1977 estis eldonita "Zapalliv ja u serci vagonj" (Ek-bruligas mi fajron en kor') de Nadija Gordijenko-Andrianova, UEA-fakdelegito pri ĵurnalismo kaj literaturo en Kiev. La biografio temas pri Vasilij Eroŝenko (1890-1952), kiu naskiĝis en Kiev kaj, en 1912, entreprenis sian unuan Esperantan vojaĝon al Grandbritio. Li pasigis plurajn jarojn en Japanio kaj verkis ankaŭ japane. En Pekina Universitato, Ĉinio, li instruis Esperanton kaj lekcii pri la rusa literaturo.

Bernard GOLDEN



Cart Théophile

AMIKECO

Yvette BRION

En majo de la jaro 1968, la sovaĝa marbordo de la insulo Oleron estis vera dezerto. Silento, paco, suno, blua ĉielo, unuvorte: "EDENO". Mia edzo turniĝis surloke... Feliĉe Dio pensis krei Evan por malenuigi Adamon. Mi do sugestis al mia domsinjoro inviti sian malnovan amikino, kiun mi ne konis. Juĝinte la ideon bonega li tuj jesis; kaj la morgaŭon mi akceptis ĉarman fraŭlinon okdek-jaran. Ŝia konversacio multe interesis min; ŝi parolis kun fervoro pri sia naskiĝinsulo. Tio kuraĝigis min peti tiun afablan personon rakonti pri la "Luma Insulo" dum la germana okupado. Sed aŭskultu f-inon Jeanne:

Mi loĝis sola en la grandega domo familia apud la urbodomo de St Pierre. Iun matenon, ektumulto! La Germanoj alvenis sur Oleron. Samkiel akrido-svarmego ili invadis nian urbeton; baldaŭ mi ricevis la viziton de la urbestro. "Kara fraŭlino mia, via domo estas rekviziita de la germana armeo. Kiel eble plej frue vi devas vakigi la lokon." - "Ĉu mia amikino Helena povos resti en la urbo?" - "Ne, ankau ŝi devos forlasi sian domon." - Do sinjoro urbestro, bonvolu telefoni al via kolego en Dolus, por ke li "forgesu" mian kamparan domon." - "Jes, konsentite. Via domo troviĝas meze de kampa dezerto; ĝi ne interesos la Germanojn."

Posttagmeze Helena kaj mi enloĝiĝis en la malnova domo, en kiu naskiĝis mia patrino. Ni kunportis niajn vestojn, niajn ŝuojn, k.t.p. Sed Helena ne forgesis proviziĝi per sia violono kaj siaj partituroj. Ni starigis inventaron: en la vinkelego ni malkovris tri biciklaĉojn; unue ni grimacis, sed... dum la milito, oni devas limigi siajn postulojn; kiam mankas turtoj oni manĝas merlojn, ĉu ne? Cetere rapidege nia filozofio evoluis. Ni decidis, ke ni neniam ploros pri ni! Ni posedis domtukojn, kaserolojn, telerojn... Do, sufiĉos lavi ĉion, kio estas malpura. Farinte grandan lavadon tra la tuta domo, ni ekvidis, ke ĉio glatas...

Ĉio glatas...kiam...la trian tagon, ĉirkaŭ la deka horo, Helena ludis violonon, dum mi senŝeligis legomojn...Rigardinte

eksteren, mi vidis du junajn oficirojn germanajn. Haltinte je deko da metroj for de la kuireja pordo, ili restis senmovaj kaj aŭskultis "La Havanaise" de Saint-Saëns. Mi pensis: "Kia tedaĵo!". Tiu popolo havas la strangan kutimon uzi lingvon, kiun mi ne kapablas praktiki! Tamen mi kuraĝe malfermis mian vitran pordon, kaj ili venis al mi. Helena reatingis min kaj ni ricevis tre ĝentilajn salutojn. Unu el ili klarigis al ni, ke ili posedas du loĝ-biletojn. Konsekvence ili enlokiĝos ĉi-tien senprokraste. Ili vizitis la domon kun ni, kaj anoncis, ke ili elektas la du ĉambrojn sur la unua etaĝo, aldonante, ke mia amikino kaj mi loĝos sur la teretaĝo. "Bone", mi replikis, "sed mi ne konsentos dormi sur la planko de la salono" "Fraŭlino, vi dormos en via propra lito". Kaj ili ekiris. "Jen, bona novaĵo", diris Helena, "unu el ili parolas nian lingvon same bone, kiel ni." - "Sed la alia estas muta", mi respondis.

Pli poste la junaj leŭtenantoj revenis kun stranga ekipaĵo: plata veturilo tirata de ĉevalo kaj...azeno! Ili alportis siajn pak-aĵojn, liton kun litaĵo, ŝrankon; kaj ili eklaboris. En mia ĉambro estis tre malnova sekretmeblo, kies tableto restis mallevita pro difekto. De malantaŭ niaj kurtenoj ni ŝtelobservis niajn "luprenantojn". Ili prenis la ŝnuron de la putoj kaj supreniris al sia ĉambro. Baldaŭ aperis ĉe la fenestro unu el la leŭtenantoj kaj la sekretmeblo envolvita en kovrilo kaj ligita per la putŝnuro. La alia oficiro venis sub la fenestron; malrapide la meblo malsuprenlitis kaj surteriĝis. Mia lito sekvis la saman vojon... Fine ĉiuj mebloj estis ordigitaj. Mi gratulis ilin, kaj... ho, kia surprizo! tiu, kiu ĝis nun ne parolis, diris en la angla: "Vi miras, fraŭlinoj, sed ni estas profesiaj transloĝigistoj." Samlingve mi respondis: "Vi parolas la lingvon de Shakespeare tiel perfekte, kiel la brita reĝo. En mia londona lernejo oni instruis la lingvon sed ne la transportadon de mebloj!" Ni kune ridis. De tiam ni povis konversacii per la franca kun Werner kaj per la angla kun Ludwig. Samtage ni havis kvaropan interparoladon pri muziko; rapide ni trafis francgermanan interkonsenton, ĉar la vivo ne eblas kun unu sola muzikilo. Cetere nur Helena scipovis ludi violonon. "Fraŭlino," diris Werner, "via piano estas en danĝeraj manoj en Saint-Pierre. Morgaŭ ĝi alvenos ĉi-tien." Kaj tuj niaj transloĝigistoj tiris kaj puŝis la meblojn de mia dormoĉambro-

salono, por lasi sufiĉan lokon al la piano. Ili sukcesis. La postan matenon kvar soldatoj kun la plata veturilo, la ĉevalo kaj la azeno, plenumis siajn dezirojn. La knaboj ne forgesis la partiturojn. Dank'al Dio ili estis plenaj de bonaj ideoj... kaj dank'al Diabolo ili senĉese fabrikis mensogojn.

Ĉi-vesperon ili vizitis la dometon, kie, iam, mia avo loĝigis siajn du azenojn. Ili balais, alportis pajlon kaj fojnon. Ne mankis la herbo en la kampoj ĉirkaŭ nia "kastelo". Tiam "Blanchette" eniris en nian rondon... Ek de tiu tago, ĉiu-vespere, ni povis plibonigi la kutiman manĝaĵaron per kaprina fromaĝo, kiun ni partigis en kvar pecojn. Helena iĝis nia fromaĝistino; cetera ĵi jam estis nia kuiristino; ni havis la ŝuon de riĉa fonto: ovo, bovinlakto, faruno, fiŝoj, kortobirdaĵo, k.t.p.. Ambaŭ Germanoj portis domenon ĉion, kion ili povis; Helena kaj mi same faris kaj ĉiutage ni kvarope vespermanĝis, lun matenon ili konfesis siajn sekretojn (aŭ mensogojn!). Ili kuraĝis sciigi al mi, ke neniam la germana armeo pagos iliajn loĝ-biletojn ĉar ili ricevis ĉambrojn en alia domo. Sed en Saint-Pierre ili ne estis sufiĉe trankvilaj kaj ne povis toleri la bruegon faritan en tiu "kazerne". "Sed," mi demandis, "el kie vi elprenis la meblojn, la kaprinojn, la pajlon?" - "Ho," diris Ludwig, "ni konatiĝis kun iu Franco, stulta aŭ kompleksema, kiu admiras nian Führer. Do, li ne povas rifuzi ion ajn al bravaj oficiroj de Hitler, ĉu ne?"

La tempo pasis... Ni multe progresis en niaj muzikaj studoj. Iun malĝojigan tagon, eta aviadilo angla falis sur la insulon; oni povis vidi du paraŝutistojn, kiuj atingis la grundon. La Germanoj trovis la flugaparaton ili retrovis ankaŭ la paraŝutojn sed la Angloj estis malaperintaj. Ili ne povis forlasi la insulon, ĉar la ununura pramo estis zorgeme gardita. Patroloj traserĉis ĉiujn domojn. Vane! La tagon post la akcidento, komence de la posttagmezo, iu suboficiro kaj du soldatoj frapis je nia pordo. Ambaŭ pianistoj estis ludantaj kvarmane. Helena kaj mi senbrue kuris en la kuirejon. En la salono Werner severe diris al ni: "Fraŭlinoj, Tiu patrolo tuj traserĉos vian domon; se vi scias ion pri la du Angloj, parolu tuj!". Ni sciis nenion kompreneble. Niaj luprenantoj ekiris al siaj ĉambroj; preterpasante mian sekretmeblon, Werner kaptis skatolon el nigra kartono, metis ĝin sub sian brakon, kaj sekvis sian kolegon. La tri aliaj viroj

vizitis la tutan domon, malfermis la murŝrankojn, rigardis sub la litojn, malantaŭ la kurtenojn; la patrolestro severmiene traserĉis la librojn kaj la diversajn paperojn, kiuj troviĝis en la sekretmeblo. Trovinte en mia domo du Germanojn, sed nenion Anglon, ili salutis kaj foriris, nenion trafinte. Ludwig iom paŝis sur la vojo por kontroli ĉu la patrolo vere forlasis nian sektoron. Tiam Werner metis la nigran skatolon sur la tablon, rigardis min kaj diris nur: "Uf!..." Helena, scivolema, alproksimiĝis al la tablo, rigardis kaj ekkrisis: "Ho!". Trankvilanime, miavice mi rigardis la misteran objekton. Sur la kovrilo estis skribita per blankaj literoj: "Armilmanufakturo de Saint-Etienne". "Malfermu," samtempe diris (per la franca kaj la angla lingvoj) ambaŭ Germanoj. Tremante, mi levis la kovrilon: revolvero kuŝis antaŭ miaj okuloj. Mia frunto kovriĝis per ŝvito; mi devis sidigi, ĉar miaj gamboj fariĝis el kotono. Mi divenis kaj klarigis, ke tiu malbeninda armilo apartenas al mia nevo, oficiro en Ŝtatsiparo. Verŝajne li posedis du revolverojn, kaj li portis tiun ĉi-tien, antaŭ ol foriri al sia bazo.

Mi ne sciis, kiel danki tiujn du germanojn, kiuj ĵus savis min. Plorante mi balbutaĉis... "Sufiĉas!" diris Helena; "ni estu seriozaj. Estas nur la tria. Mi havas tempon por fari kukon. Jeanne, ĉu vi povas proponi al ni... likvaĵon?" - "Kompreneble mi havas trinkaĵojn, sed miaj boteloj estas en Saint-Pierre. Sed la pordo estas ŝlosita". Mi klarigis al niaj amikoj, kie dormis mia stoko. Afable ili transportis mian botelaron. Ili lasis la pordon malfermita, por ke ĉiu sci, ke estas neniu sekreto en mia domo! Vespere ni manĝis la torton de nia kuiristino kaj trinkis ĉampanvinon. La morgaŭon ni enfosis la danĝeran armilon, taŭge protektitan sub la kuŝpajlo de Blanchette; mia nevo retrovis ĝin sendifekta post la milito... Werner kaj Ludwig adiaŭis nin por iri "defendi" nian insulon. Ni neniam ricevis de ili eĉ unu vorton. Ĉu ili forgesis nin? Ĉu ili ne emis revidi Oleron? Ĉu ili mortis? Mi sugestis, ke ni vizitu la germanan tombejon, sude de Saintes. Sed la du fraŭlinoj ne kuraĝis tie legi la liston de la mortintoj.

Por ŝanĝi iliajn pensojn mi faris al ili la demandon: "Kaj la Angloj? Kie ili kaŝis sin?" Kaj oni rakontis al mi:

" La haveno de La Co'tinière estis bone gardita de la Germanoj; tage kaj nokte patrolo observis la enirojn kaj elirojn de la fiŝipoj laŭ la ritmo de la tajdoj. Ĉiutage suboficiro kaj du soldatoj kontrolis la nombron da viroj, kiuj enŝipiĝis en ĉiun ŝipon; vespere, sammaniere ili nombris la virojn, kiuj elŝipiĝis. Sekve, neniu viro povis malaperi... La brava militisto kutime metis amike sian manon sur la ŝultron de la fiŝkaptisto preterpasanta...Tiel bone, ke ĉiun tagon la deĵoranta kalkulanto dufoje tuŝis du... anglajn ŝultrojn.

Liaj kolegoj daŭre serĉis tra la vitejoj, la kampoj, la herbejoj kaj la arbaroj du malbenindajn Anglojn, kiuj eble ne scipovis la lingvon de Voltaire aŭ prononis ĝin kun la akcento de Sir Winston...Vel! ĉiuj viroj centfoje kontrolitaj parolis nur la francan lingvon kaj...la ĉarentan dialekton!

Kaj serĉeme f-ino Jeanne aldonis: "Kiu pli similas al franca fiŝkaptisto muta? Tiu estas angla aviadisto silenta!"

La Vento forportos nun tiun malnovan historion.

Y. BRION

KIEN MI DEVAS SENDI MIAN ABONON?



Ne plu cerbumu! Rigardu la unuan kovrilpaĝon (franca adreslo), aŭ la lastan (niaj perantoj).

NI RIDU

Avo rakontas al unu el siaj nepoj rakontojn pri sia vivo. "Iam mi estis atakita de kvin malsategaj leonoj..." - "Sed, avĉjo, kiam vi jam rakontis tion al mi estis nur tri leonoj" - "Mi scias, sed tiam, vi estis tro juna por aŭdi la tutan teruran veron".

En la preĝejo, junulo kolektas monon. Maljunulo metas monereton en la pleton kaj demandas: "Kien iros tiu, mono?" - "Al la Sinjoro" - "Bone", respondas la maljunulo reprenante sian moneron, "Mi estas 75-jara kaj mi certe vidos la Sinjoron antaŭ ol vi. Mi donos la moneron rekte al li."

En drinkejo la estro proponas enigmon al la klientoj. "Mia patrino naskis infanon. Tiu infano estas nek mia frato nek mia fratino. Kiu ĝi estas?" Neniu kliento sukcesas respondi. "Estas mi!", triumfe diras la drinkejestro. Reveninte hejmen Johano diras al sia edzino: "Jen bona enigmo: mia patrino naskis infanon, kiu estas nek mia frato nek mia fratino. Kiu ĝi estas?" Ankaŭ la edzino cerbumas sed ne trovas respondon. Kaj Johano triumfe diras: "Estas la drinkejestro!".



Viro falas de la kvina etaĝo. Li mortas. Lia vidvino ricevas de la asekuro dikan sumon. Sed venas la notario, la familianoj, la kreditoroj... Al amikino ŝi diras: "Okazas, ke mi preferus mian edzon viva".

GASO

KALMAN SANDOR

Tagiĝis. Frumatena krepusko. Kvina horo. La urbo dormis. Dormis la arboj, dormis la domoj, dormis la stratoj kaj en la fundo de ĉambroj, kies fenestroj estis kurtenitaj, sub molaj kovriloj, ronkante, ŝvitante, inkube sonĝis la dormantoj.

La verkistspeca homo staris en nigra vesto, striita pantalono, sur la fervoja ponto, en la supra parto de la urbo kaj rigardis la akvon. Tagiĝis. Venteto blovis, milde ondigis la akvon. La akvo estis flaveca kaj iom malklara sed cetero ĝi pace fluus. Sur la vizaĝo de la viro vidiĝis duataga barbo.

"Nu, ĉi tio estos bona", pensis kontente la viro kaj profunde enspiris la fumon de sia cigaredo. "Guste konvena," li amare balancis sian kapon, "la romanon mi certe ne verkos. Romanon skribi estas ege malsaĝe, belan romanon. Sukceso... mono...ĉio..." -li mansignis- "kial denove komenci." Sur la ponto vagonaro trabuŝis; sur la koridoro de la dormvagono piedpinte iradis la konduktoro; en la vagonoj ankoraŭ brilis dormemaj elektrolampoj.

"Mi havas la honoron", diris moke la sinmortigonto al la vagonaro, "ĉi tie nun mortos verkisto"; kaj li senzorge eklevis sian ĉapelon. "Chemins de Fer de l'Est" li legis laŭte sur unu vagono. "La verkisto ne verkis romanon; li nun mortas". Li suprenŝovis sian ĵakon, poste sur siajn okulojn tiris sian ĉapelon, kun decida movo forĵetis sian cigaredon, kiun li aĉetis por siaj lastaj fileroj kaj li transpaŝis la parapeton. "Ne bone, tute malbone" li pensis, kun kurbiĝintaj lipoj, farante transkapiĝon en la aero, "malbone ke mi estas lerta naĝanto; longe daŭros." Kaj tiam, ĝuste dum la transkapiĝo en la aero, li ekaŭdis la fajfegadon de la sirenoj.

La suno leviĝis. La sinmortiganto kun laŭta plaŭdo atingis la akvon. La bato estis forta, li preskaŭ svenis...Sub la akvo li malfermis siajn okulojn. Malklara flav-eca balanciĝo. Super lia kapo heliĝas. En liaj pulmoj ĝiskreve treĉiĝas la eluzita aero, la vesto falde gluiĝas al lia korpo.

Tre malvarma estas la akvo. "Nu," diris teruriginte la sinmortiganto, "kio estas..." kaj lia buŝo pleniĝis de akvo. Malespere li frapadis ĉirkaŭ si. Li volis kriegi; malsupra akvo eniĝis en lian buŝon. "Ho...upp..." li diris kaj forte piedsvingis. Kelkajn regulajn movojn li faris kaj li estis supre, ĉe la supro de la akvo. "Diablon," li pensis amare; "ĉu estas tiel malfacile morti?"

Tre malvarma estas la akvo. La vesto malseke gluiĝas al lia korpo. Li mortos. Kial li ne razis sin antaŭe. Malbenita mono. Liaj brakoj estas lacaj pro la frapadoj; lia hararo falis en la okulojn. Weissmüller dum 58 sekundoj naĝas cent metrojn kaj li spiras sur la maldekstra flanko. La sinjoro verkisto mortos. En la vesto estas pli malfacile. Portas lin la akvo. Li mortos. Li ne skribos la romanon.

"He, homoj", li volis kriegi kaj li ektimis pro sia ĝemanta akvoglutita voĉo. malvarma estas la akvo. Ĉi tie sinmortiganto baraktas. Skandalo! Kie restas la savboato de la polico? Verkisto dronas ĉi tie en la malvarma akvo kaj nun oni lasas lin morti. For la registaro! Ĝeneralan sekretan balotrajton ankaŭ por la mortintoj. Li pensis amare kaj ekkuŝis sur sian dorson. Profunde li spiris. Tiel jam estas pli bone. "Tiel, jes," li diris; ĉi tion li legis, kiel infano en la romano de kamparano kaj nun subite li rememoris. Malrapide portas lin la akvo. Sed li restas supre. Ĉu ne egalas, kie li atingos la bordon?...ĉe la buĉejo...aŭ ĉe la panfabrikoj... aŭ ĝuste en la mezo de la urbo. Jarcento pasis de kiam li saltis en la akvon. Malsaĝaĵo. Kiu naĝi povas, tiu kuŝiĝu sub vagonaron, ne saltu en la akvon. Droni estas pli malfacile ol skribi romanon. Ne estas bone. Se li elnaĝos, li kuŝiĝos antaŭ vagonaron.

Malrapide lin portas la akvo. "Chemins de Fer de l'Est". La sinjoro verkisto nun mortas. Li pensis malvigle kaj rigardis la ĉielon. Triumfa vojo de sinmortig-kandidato, malsupren sur la rivero. Ambaŭflanke la urbo. Dormas la urbo. Neniu helpas lin. Li vojaĝas sub la pontoj, surdorse kuŝante. Sur la pontoj brilas ankoraŭ la lampoj. Oni forgesis estingi ilin. Kulpa urbo. Estas stranga la ĉielo. Sirenoj fajfegas. Groteskformajn, flavajn nubojn pelas la vento supre en la aero. Strangaj nuboj. Ie motoroj de aeroplanoj muĝas. "Malbonodore estas; eĉ en la akvo

malbonodore estas," pensis la laca viro, ĉar li ankoraŭ ne sciis pri kio propre temas. Li grimacigis sian nazon. Groteskaj flavaj nuboj. Estus bone jam atingi ie la bordon. Poste ja denove komenciĝos ĉio.

Kelkajn movojn li faris per la piedoj kaj li venis en la bordan fluon. Plaudante portis lin la akvo. Ankoraŭ kelkajn metrojn. Li lace elrampis sur ŝtonstuparon. Li sidigis sur ŝtonstupo. Malseka, taŭgita. "La aero estas prema kaj sufoka; strangaj odoroj kaŝiĝas ĉie. La urbo estas nekutime silenta. "He, kio estas tio?" diris la sinmortiganto maltrankvile. "Ĉu haltis la tramoj kaj la aŭtoj?" Li rigardis la ĉielon. La suno iris alte jam. Ĝia telerio estis tamen pala, ĝia lumo senforta. "Suneklipso," miris la viro. Li ekstaris, viŝis sian frunton, suprenrigardis en la aeron kaj denove rimarkis flavetajn nubojn. Super la etaĝaj domoj supreniĝante flugadis jam la flavetaj nuboj. Satigitaj, laborfinintaj, kaŝmurdaj flavetaj gasnuboj. Sed ĉi tiu povis scii la sinmortiganto, ĉar li ignoris la mondpolitikon; li estis verkisto kaj li estis la sola homo en la tuta urbo, kiu vive rifuĝis de la gasatado de l'Aliancaj Potencoj.

Malrapide, enpensiĝinte, li ekiris sur la kajo supren. Lia vesto sekigis iomete. Nenie li vidis homon. Tie, sur la reloj, staras flava tramo. Tie ne estas haltejo. Kial staras tiu tramo? Per hezitaĵ pasoj li iris ĝis la tramo. Ĉe la fenestroj, kun balanciĝantaj kapoj, sidas la vojaĝantoj. La kondukisto staradas strange kliniĝante sur la aerbremson. "Nu kial ni ne iras?" demandis la sinmortiganto kaj scivole li ascendis la tramon. La kondukanto spasme premis la tenilon de la aerbremso. "Ĉu estas iu akcidento, sinjoro kondukanto?" ĝentile demandis la sinmortiganto. La kondukanto, dorsmontre al li, staris senmove kaj ne respondis. Senpacience la sinmortiganto ekskuis la ŝultron de la kondukanto. Tiu ĉi ŝanceliĝis kaj flankenfalas sur la plankon; lia dekstra mano, per morta gesto, ektiris la premilon de la kontakto kaj la tramo malrapide ekiris. "Kio okazas?" diris la sinmortiganto, ja mortis la gvidanto! Li flankenŝovis rapide la pordon kaj eniris la tramon. La kondukatoro transverse kuŝis sur la planko; maljuna sinjoro sidis sur la benko, kun gazeto en la mano, kaj la kapo antaŭenklinita, kvazaŭ li estus leganta. "Mi petas vin," komencis la sinmortiganto, "ne moku; la tramo iras; ĝia estas...helpon!" La vizaĝo de la maljunulo estis nigra, la vizaĝo de la kondukatoro estis nigra; la vizaĝo de la kondukanto estis

nigra; la tramo malrapide iradis, poste alpuŝiĝis al la tramo staranta antaŭ ĝi kaj haltis. Kun klakantaj dentoj la sinmortiganto eltramiĝis kaj komencis migradon en la mortinta urbo. Mortintoj, ĉie mortintoj.

Ĉe la unua kadavro gapa teruro tranĉis en la koron de la viro. Ĉe la dua li kredis, ke li freneziĝos. Ĉe la tria, ĉe la centa kadavro li jam apatiĝis. Li trairis la urbon. Li vizitis ankaŭ la vendejojn. La spicisto, kun nigra vizaĝo, kurbe apogis sin ĉe la pupitro; la ŝuisto antaŭenkliniĝante sidis apud la ŝuteno; en la kafejoj mortintaj homoj legis la ĵurnalojn. La tramoj haltis; ĉi tie rompita kuŝis aŭtomobilo. Tie, la trafikpolicisto ĵus suprenlevis sian brakon por signi liberan vojon al aŭtisto. La aŭtisto mortinta sidis ĉe la direktrado; lia piedo estis sur la gaspedalo. La motoro bruis malplene; la mano de la aŭtisto estis ĝuste sur la unua rapideco. En la tombejo kadavro kuŝas en ĉerko; kvar aliaj kadavroj ŝajne volas ĝin enterigi. En banko kasisto kalkulas monon, kiu kuŝas antaŭ li sur la pupitro. La sinmortiganto karesis la dikajn biletfaskojn. "Malbenita mono", li diris kaj malame kraĉis, "mi nun foriros. Mi kuŝiĝos sub la vagonaro. Kia terura epidemio estis en tiu urbo?" Li ekiris al la stacidomo. En la giganta vitrohalo silente staris la vagonaroj. La nigraj literoj de la elpendigita horaro moke kaj mensoge rikanis al li. Ne ekiras vagonaro. "Hu," diris li mal-kontente, "tie eĉ morti ne eblas. Diablon, oni trompis min." Larmoguto aperis en liaj okuloj. Sur la stratoj kuŝis amaso da flavaj paperoj. Li levis unu. Ĝi anoncis la unuan gasatadon de l'Aliancaj Potencoj. Ĉio estas klara nun. Tra la ondoj de la rivero ne penetris la gaso Li estas verkisto, li volis morti. Ne lia kulpulo, ke li ne sukcesis. La romano, jes. Nun ĉio estas simpla. Li devas skribi la romanon. Mallaŭte li ekridis.

Li eniris en papervendejon kaj elektis por si kelkajn foliojn de delikata papero, enpoŝigis dikan fontoplumon, sidigis en kafejo kaj kun febra ambicio li komencis skribi senprokraste la romanon.

Kiam la savtaĉmento kuraĝis eniri la urbon ili trovis nur unu homon, kiu sidis ĉe la fenestro de kafejo. Sur la tablo amase kuŝis plenskribitaj paperfolioj. Oni devis lin perforte forporti de la tablo.

El la hungara: Parvus Piscis

POR VIA DISTRO

La ŝlosilvortoj estis: Jugoslavio - Nikotino - Sarkofago - Januaro - Vendredo - Edelvejo - Kristnasko - Japanujo - Mediteraneo - Ripeti - Sceptro - Privilegio - Tulipo - Teretaĝo.

La interesa aserto de d'Alembert estas:
" Germanujo estas kreita por vojaĝi tie,
Italujo por restadi tie, Anglujo por pensadi
tie, Francujo por vivi tie".

NIA KONKURSO

"Ĝi konsistas el 6 enigmoj, kiuj aperos en Kulturaj Kajeroj en tri sinsekvaj numeroj. Vi povas tuj sendi viajn solvojn al la redakcio, aŭ konservi ilin kaj sendi la ses solvojn en la fino de la konkurso. Oni akceptos la respondojn ĝis unu monato post la apero de la du lastaj enigmoj.

Gajnos la 1-an premion, 1 000-frankan stipendion por restado en Gresillon, tiu kiu ricevos plej multe da poentoj.

La 2-a premio konsistas el 500-franka stipendio por restado en Gresillon.

La 3-a premio konsistas el 250-franka stipendio por aĉeto de libroj el la Libro-Servo.


1-a enigmo - (14 poentoj)

Trovu la 13 sekvantajn ŝlosilvortojn:

1. parto de la korpo. 2. meblo. 3. malsano. 4. granda elefanto. 5. difekto en vesto. 6. trinkujo. 7. monato. 8. la plej bela verbo. 9. franca urbego. 10. frukto. 11. astro; tempo-daŭro. 13. fiaski.

Elprenu unu literon el ĉiu vorto kaj lasu ilin en la vico de la vortoj; Vi devas trovi 13-literan vorton signifantan: memvola limigo de naskoj.

2-a enigmo - (10 poentoj)



14-

HORIZONTALE- 1.Ordenpovo. 2.Marbesto (r.). 3. Ne scii, kion fari; movo. 4.Praistoria epoko; pronomo. 5.Litero; interne; nur ĝi povas malpurigi (r). 6.Sola objekto; maniero prezenti aĵojn. 7. Funkcio (r); korp parto (r). 8. germana soldato(r); tre valoras. 9.Riverego (r); litero; altiri(r). 10.Arkitektura angulo; tre longa.

VERIKALE- 1.Speco de kvarco. 2. Malofta gaso; sufikso. 3.En vesto, nepre plenigota; bleki. 4.Interna korp parto. 5.Litero; sufikso; antikva pastro. 6.Kiel alia; por klubo, nur unu ne sufiĉas. 7.Inerta pezo; prepozicio. 8.Kolekto; liaj gepatroj estas eŭropaj, sed li ne. 9.Ili movas ion. 10. Li studas la birdojn.

LA VIVO EN GRESILLON

KOMITAT-KUNVENO - Dimanĉon 1 -an de oktobro 1996

Ĉeestis la kunvenon: D. Babin, F. kaj H. Boyet, B. Cheverry, G. Dairon, D. Gourdon, G. Lagrange, P. Métivier, P. Naulet, M. Noulín, J. Vincent. La aliaj komitatanoj senkulpiĝis.

STAĜOJ 1996: La nombro da staĝanoj estis iom pli granda ol en 1995 dum preskaŭ ĉiuj periodoj. En junio okazis agrabla kaj kvieta restado kun preskaŭ nur la "tradiciaj" partoprenantoj. En julio dum la unuaj du semajnoj la nombro da kursanoj estis pli granda. La dusemajnaj kursoj por komencantoj akceptis multajn diligentajn lernantojn. Dum la 3-a kaj la 4-a semajnoj la nombro da staĝanoj iomete malgrandiĝis. Ne sufiĉe multaj partoprenantoj ĉeestis la seminarion pri gramatiko kaj tradukado. La lernado de la franca lingvo pere de Esperanto treege interesis kelkajn vizitantojn. Dum la 5-a kaj la 6-a semajnoj la partopreno estis sufiĉe ampleksa: 40 staĝanoj el kiuj multaj novaj vizitantoj. Multaj eksterlandanoj ĉeestis ankaŭ dum la lasta periodo. Lastatempe neantaŭviditaj kursoj estis organizataj por kontentigi multajn petojn.

Konklude la jaro 1996 prezentas bonan financon aspekton. La restad-enspezoj kreskis: 272 000 frankoj; nur 230 000 f. en 1995. Ĉiuj ĉapitroj de la financa bilanco simile kreskis. Multaj libroj estis venditaj. Sed la donacoj por la Infanrenkonto iomete falis. Male la fonduso "filmo" iom kreskis.

La refaro de la duŝejoj kaj de la necesejoj de la unua etaĝo kaj plafono de la antaŭkuirejo estis finita nur la 7-an de julio. La asekura kompanio rapide pagis sumon, kiu preskaŭ tute kovras la elspezojn.

STAĜOJ 1997: La renkonto de la Okcidenta Federacio okazos dimanĉon 20-an de aprilo 1997. La unusemajna Printempa Renkonto de Infanoj komenciĝos sabaton la 12-an de aprilo ĝis la 19-a. Jam multaj informpetoj estis senditaj al P. Naulet el diversaj landoj.

La unua somera staĝo komenciĝos la 20-an de junio. Poste sinsekvos unusemajnaj staĝoj kun la kutima programo. De la 13-a ĝis la 20-a de julio okazos kursoj pri gramatiko kaj pri pedagogio. S-ino Vincent instruos la francan lingvon pere de Esperanto. Georges Lagrange gvidos kurson pri tradukado dum la posta semajno. Pczemek revenos kaj instruos dum du semajnoj ek de la 10-a de aŭgusto. En 1997 ni omaĝos la fondinton de la Kultur-Domo Henri Micard, okaze de la 100-jara datreveno de lia naskiĝo. Prelegoj temos pri li kaj lia vivo.

La prezidanto de JEFO kontaktis D. Babin por organizi seminarion en la kastelo de la 1-a ĝis la 7-a de aŭgusto kun 150 gejunuloj. Sed la kastelo povas akcepti nur 90 personojn kaj la dato elektita ne estas oportuna. Novaj kontaktoj estos necesaj. S-ro Hartridge, kiu ne povos veni venontjare deziras subvencii kelkajn britajn esperantistojn, kiuj ŝatus veni en Gresillon. Ankaŭ John Rapley zorgos pri la afero.

DIVERSAĴOJ: G. Lagrange prezentas la projekton de M.T. Lloancy pri la verkado kaj publikado de kolektiva memorlibro koncerne la historion de la Kultur-Domo. Ĉiuj amikoj, kiuj konservis memoraĵojn pri sia restado en Gresillon povas sendi ilin por publikado. Estas antaŭvidita reproduktado de la du filmoj pri la vivo en Gresillon sur videobendoj. Nova fotokopilo estos aĉetita. Ankaŭ aĉetota estas nova abelujo por anstataŭi iun fariĝintan kaduka. Por eviti novan "katastrofon" la duŝejojn de la dua etaĝo estos refaritaj.

La sekretario: Guy Dairon

NIAJ PERKORESPONDAJ KURSOJ

POR LA KOMENCANTOJ: Kurso per mem-korekta metodo. Tiu metodo ebligas progresadon adaptitan al la ritmo elektita de la lernanto, kiu, paŝon post paŝo, korektas mem siajn erarojn. Testo-folioj sendotaj al la korektanto ebligas kontrolon. La korektanto tiam atentigas la lernanton pri la lingvaj punktoj ankoraŭ ne bone asimilitaj.

La prezo de tiu kurso estas: 200 fr. fr.

POR LA PRAKTIKANTOJ: por akiri la praktikadon de la lingvo. Ilustrita kurso, tekstoj, gramatikaj rimarkoj, taskoj sendotaj al korektanto.

La prezo de tiu kurso estas: 200 fr.fr.

SUPERA KURSO: De- kaj al-tradukoj, atentigoj pri gravaj gramatikaj punktoj, ĉefaj eroj de la historio de Esperanto. Bona preparado al la Atesto pri Kapableco.

Prezo de la kurso: 150 fr.fr.

NIA LIBRO-SERVO

POR LA PRAKTIKANTOJ: (P. Babin) - Taŭga por paroligi progresantojn.
5-a eldono - 35 fr.fr.

GRAMATIKA GVIDLIBRO: modernigita prezento - 50 fr.fr.

PREPARADO AL LA ATESTO PRI KAPABLECO: (A. Ribot) - 3-a eldono revizilita -
Prezo: 30 fr.fr.

NOVE AKIRITAJ POR LA PLI JUNAJ KAJ LA KOMENCANTOJ. BELAJ ILUSTRAĴOJ.

a) Serio da novaj ĉinaj rakontoj:

Lerni pentradon (12 ff.) - Levi ŝuon (12 ff.)

Rakonto pri Sima Guang (15 ff.) - Serĉi instruanton (17 ff.)

b) Aliaj rakontoj:

La novaj vestoj de la imperiestro (53 ff.)

La dorsosako de Panjo Rut' (Bako-Piron 80 ff.)

Por progresantoj:

Memorlibro omaĝe al Andreo Cseh (80 ff.)

La kruĉo da saĝeco (Eroŝenko 45 ff.)

Mendu de S-ino Vincent, 26bis, rue de Milngavie, F-49150 BAUGE, sed NE sendu monon. Atendu la fakturon! Dankon.



GRAMATIKO PER BONHUMORO



KONJUNKCIOJ

ESTAS NEŜANGEBLAJ VORTOJ, KIUJ KUN-
LIGAS VORTOJN KAJ FRAZOJN DE SAMAJ
natura kaj funkcio :
aŭ, ĉar, do, kaj, ke, nek, sed, tamen.

ILI PRECIZIGAS LA RILATON INTER LA FRA- ZELEMENTOJ :


- **diferenco** : (aŭ ekvivalento) teo aŭ kafo-venki aŭ morti-nitrogeno aŭ azoto.
- **klarigo** : li estas mia onklo, ĉar frato de mia patro.
- **logikan konkludon** : mi devas do decidiĝi, ĉar vi tion volas.
- **kunligon** : mi vidis kaj lin kaj lian fraton.
- **ankaŭ ne** : restas nek konsilo, nek konsolo.
- **kontraŭecon** : longo miela sed koro kruela.
- **malgraŭ tio** : la maljuna avo tamen restis ĉe sia laboro.

Pacienco kaj longtempo...



Finfine mi denove povos agrable tranokti en mia fotelo. Dum unu tuta semajno, ĉiun nokton, sinjoro Arnoldo fajlis kaj fajlis... la duoblan baron de sia fenestro. Kredu min, estas tre malagrabla. Finfine, li sukcesis eskapi.

Ha ! tiuj infanoj !



Ne kaj ne ! mi bedaŭras, sed, la lastan fojon, mi ripetas, ke mi ne povas kontentigi vin ; ĉar mi ne havas sterilizitan lakton !

Povra karulo !



Mi petas vin, Sinjoro Direktoro : mi ne povas legi tion, kion vi skribis sube de mia verkajo : do, estus bone, ke vi pli legeble skribu !

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Belgio : Librovendejo Karlijono, vzw Doornstraat 22. 2610 Wilrijk Akceptas kreditkartojn - prezo : 600 BEF.

Britujo : John C. Rapley, 17 The Grange, Shepherdswell, Dover, Kent CT 15 7 Q B. (10 pundo)

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (90 krono).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (70 mk.).

Germanujo : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frai (M. 2759 35-609) (25 D.M.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10^a-D 03003 ALICANTE - (1 700 pe

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura (20.000 liroj).

Japanio : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaši-Nakano, Hatiôziŝi TO

Jugoslavio : Jelena Andjelkovic, Nova 61/1, YU-11213 Beograd

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (28 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 18 n.z.dol).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, ul. Krucza 38/42 00512 VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugallio : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboa (2.800 esk.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.ĉ. : 2012-3 (80 kr.).

Svislando : Esperanto Perkoresponde, Claude Gacond, strato Chevreuils 14, CH-2300, La Chaux-de-Fonds, PK.23-4669-1 (22 s.f.)

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale lajn ajn karavanojn frue anoncintajn

Akceptas :

Por ripozaj trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempe ;
Por ekskursi tra cent-rokcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34